

## *Amitayus-Sutropadeŝo<sup>1</sup> kun la Himno de Pieco*

### 無量寿經優婆提舍願生偈

de **Bodisatro Vasubandhu**  
ĉinen trad. **Bodiruĉi**  
trad. **T. Jamamoto**, Japanio

#### 1. La Himno de Pieco

Ho, Beatulo<sup>2</sup>! Per mia tuta koro mi prenas rifuĝon en la Tathagato<sup>3</sup> de tra-la-universo-penetranta-senbara-lumo, kaj sopiras renaskiĝi en Lia Lando Beata. (1)

Bazita sur liaj veraj bonoj rimarkigitaj en la sutroj<sup>4</sup>, mi verkas la Himnon de Pieco kiu trafe enhavas ilin, kaj trafe akordas kun la instruo de Budho. (2)

En meditado mi observas ke la lando superas tri mondaĉojn<sup>5</sup> en eminenteco. Ĝi estas ĉiam kiel la bluĉielo vasta kaj senlima. (3)

La lando estas deveninta de lia supermonda bonradiko kaj lia granda kompatato de la absoluta justeco. Ĝi brilas perfekte kiel spegulo, la suno aŭ la luno. (4)

Provizitaj estas altvaloraj trezoroj kaj ravegaj ornamaĵoj abundas. Sankta lumo brile lumas tra la lando. (5)

Sankta herbo de favoriga naturo ondas delikate tien kaj reen. Ĉiu, kiu ĝin tuŝas, sentos superegan plezuron multe pli ol Kacilindika<sup>6</sup>. (6)

Fontoj, riveretoj kaj lagetoj estas superkovritaj per miliono da belaj floroj. Milda venteto venadas por karesi la florojn kaj foliojn kaj ilin ekŝancelas kaŭzante diverskolorajn ekbrilojn. (7)

---

<sup>1</sup> Vidu "Nanjo's Catalogue of the Chinese Translation of the Buddhist Tripitaka, N. 1204"

<sup>2</sup> Budho Ŝakjamuni

<sup>3</sup> Budho Amio, same kiel Budho Amitajur

<sup>4</sup> Tri mahajanaj sanktaj skriboj, kiuj konsistas el la Granda kaj Malgranda Sukhavati-vjuhoj kaj la Smitajur-dhajana-sutro.

<sup>5</sup> Tri malsamaj regnoj de malsupera estaĵaro, kie vivas devaĵoj, homoj, asuroj, animaloj, malsateguloj kaj inferaj diabloj.

<sup>6</sup> Herbo de bela mola fibro

Palacoj kaj turoj malsupren rigardas la pejzaĝon sen kontraŭbaro en ĉiuj direktoj. Jen estas diversspecoj de arboj, ĉiu el apartaj nuanco kaj belegeco, kaj ilin ĉirkaŭas la terasoj el ĝemoj. (8)

En la ĉielo, jen estas penditaj sennombraj juveloj kaj aroj da tintilretoj. Ĉiu tintilreto sonoras kaj deklare eligas la plej superan darman voĉon. (9)

Ĝi surŝutas la ornamaĵojn de floroj, vestoj kaj abunde de bonodoroj kiuj bonodoras universale. La Budha saĝo, brila kaj serena, estas lumanta kiel la suno forigas la mallumon de nescio. (10)

La glora nomo (de la lando), kies aŭdado kaŭzas profundan kaj subteran spirit-vervekiĝon, disvastiĝs foren en la dek direktoj. La lando estas ĉefe traprezidata de perfekte elliberiĝinta Amitajus, la Reĝo de leĝo (Darmo). (11)

La belaj estaĵoj de la Tathagato mirakle naskiĝas el la floroj de lia plej supera saĝo. Ili ĝuas la guston de la Budho-darmo, kaj igas ĵanon kaj samadhion<sup>7</sup> sia nutraĵo. (12)

Tie ne ekzistas por la estaĵoj ia doloro ĉu korpa aŭ spirita, sed plezuro por ĉiam kaj konstante. En tiu ĉi bonkvalita modo de Mahajano, ebena kaj ekvipolenta ne aŭdiĝas eĉ la nomoj de naŭzo kaj klaĉo. (13)

Virinoj, kripluloj kaj Dvitiya-yana<sup>8</sup> ne naskiĝas en tiu ĉi regno. Kion la vivantaj estaĵoj deziras ĝui, ĉio estos kontentige plenitiga. (14)

Mi do deziras renaskiĝi en la regno de Amitajus (Amido) Budho. Tiu ĉi granda reĝo de nekalkuleblaj trezoroj sidiĝas sur superbelega lotus-trono<sup>9</sup>. (15)

Lia aŭreolo estas unu klafton vasta; Liaj vizaĝkoloro kaj staturo estas multe pli superaj ol tiuj de ĉiuj aliaj estaĵoj; Kaj Lia superbelsona voĉo aŭdiĝas en ĉiu direkto de la regno. (16)

Samkiel tero, akvo, fajro, vento aŭ ĉielo, Li havas enian distingan koron. El lia pura saĝo naskiĝas la ĉieluloj kun konfirmkredo<sup>10</sup>. (17)

Samkiel la reĝeca Monto Sumeru, Lia superegeco staras sen rivalo, kaj ĉieluloj adoras kaj ĉirkaŭas lin kun riverenco. (18)

Jen neniu estas kiu observas la efikon de la Origina ĵurpromeso de la Budho, kaj forpasas sen ricevi ĝian influon. Ĉiu observanto estas tuj kontentigita per la nemezureblaj trezoroj meritplenaj aŭ virtoj. (19)

En tiu ĉi lando de Feliĉo, pura kaj serena, ĉiam moviĝas la senmakula leĝ-rado. La manifestitaj Budhoj aŭ Bodhisatvoj estas similaj al la suno aŭ Monto Sumeru kiu superregas la mondon. (20)

Ilia solena lumo brilas ĉiumomente je la kunvenoj de diversaj Budhoj kaj tiele donas favoron al ĉiuj sentpovaj estaĵoj. (21)

Ili surŝutas ĉielmuzikon, floron, veston kaj mirindajn parfumojn por fari oferojn

---

<sup>7</sup> Du specoj de ekstazo aŭ meditado

<sup>8</sup> Śrāvaka kaj Pratyeka budho, aŭ du gradoj de liberiĝo malpli altaj ol Bodhisatvo.

<sup>9</sup> Simbolo de pureco

<sup>10</sup> Akampuya en Sanskrito, kiu signifas Bodhisatvon, kiu estas konfirmita en la mahajana kredo.

kaj kune laŭdas pri la Budhaj bonoj. Ili eĉ ne havas peceton da partieca koro. (22)

En kia ajn lando kie ne ekzistas la bonega trezoro el la Leĝo de la Budho, mi esperas, ĉiuj estaĵoj naskiĝu kaj elmontru la Budhan Leĝon kiel la Budho mem. (23)

Mi estas verkanta tiun ĉi himnon kaj skribonta traktaton, ĉar kun pieco mi esperas ke mi renaskiĝu en la Regno Beata, kaj vidu Amitajus Budhon kune kun ĉiuj aliaj estaĵoj. (24)

En la supra himno mi jam priskribis la ĝeneralan signifon de Amitajus-sutroj.

## 2. Signifo de la Himno

Tiel mi diras en la traktato: - Kion signifas tiu ĉi pieca himno? Ĝi signifas ke ĉiu meditadu la Landon Beatan, prezentu al vi Amido-Budhon kaj sopiru renaskiĝi en Lia Lando.

## 3. Kvinobla Spirita Vojo

Kiel meditati kaj kiel havi la kredon? Se filo aŭ filino de bona familio praktikas la kvin spiritajn vojojn sukcese, li aŭ ŝi povos esti destinita renaskiĝi en la Lando Beata kaj vidi Amitajus-Budhon.

Kio do estas la kvin spiritaj vojoj? La unua estas la vVojo de Adorado; la dua la Vojo de Laŭdado; la tria la Vojo de Preĝado; la kvara la Vojo de Meditado; kaj la kvina la Vojo de Merito-trunado.

Kiel adori? Humiligu vin mem al Amitajus Tathagato Arhato aŭ Samjak-sambudho<sup>11</sup>, havante la deziron por naskiĝi en Lia Lando.

Kiel laŭdi? Esprimu vian elkoran laŭdon, recitante la nomon de la Tathagato prezentita de la saĝlumo de la Tathagato. Volu sekvi la praktikon, kredante je Lia nomo kaj ĝia signifo, kiel ili montras.

Kiel preĝi? Oferu preĝon ĉiam en koro, pripensante tutkore kaj pie pri la fina naskiĝo en la Lando Beata, kaj volu sekvi obeeme la praktikon de Ŝamatha<sup>12</sup>.

Kiel mediti? Estas intelekta ekzameno. Prave kontemplaciu kaj meditadu la objektojn en la regno, esperante ke vi daŭrigu obeema la praktikon de Vipaŝjana<sup>13</sup>. Jen estas tri specoj pri meditado. Kio estas la tri specoj? La unua estas meditado pri la meritoplenaj ornamaĵoj el bonoj de la Budho-lando; la dua la meditado pri la meritoplenaj ornamaĵoj el bonoj de la Budho; kaj la tria la meditado pri la meritoplenaj ornamaĵoj el bonoj de la Bodhisatvoj.

Kiel turni meriton? Ne preterlasu ĉiujn suferantajn estaĵojn indiferentaj; sed preĝu ĉiam en koro por maturigi vian grandan kompaton, ĉefe havigante al ili vian

---

<sup>11</sup> Epiteto de Budho; Arhato signifas tiun, kiu meritas ricevi aliajn oferaĵojn, kaj Samjak-sambudho tiun, kiu obtenis perfektan liberiĝon.

<sup>12</sup> Iu speco de meditado.

<sup>13</sup> Iu speco de meditado.

propran havaĵon meritoplenan.

#### 4. Meditado pri la Budha Lando

Kiel meditati pri la solenigataj ornamaĵoj plenaj de la merito de la Budha lando? La solenigataj ornamaĵoj meritoplenaj de la Budha lando estas elfaritaj per mirakla povo, kiu estas, kvankam ne facile analogigebla, kiel tiu de sorĉjuvelo de Mani. Estas konate ke ili konsistas el dek sep specoj. Kiaj do estas la dek sep?

1. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de pureco.
2. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de grandeco.
3. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de naturo.
4. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de trajto.
5. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de ĝenerala provizo.
6. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de brileco
7. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de tuŝo.
8. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de triobla objekto.
9. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de pluvfalo.
10. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de lumo.
11. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de famco.
12. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de majstro.
13. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de loĝanto.
14. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de ĝuo.
15. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de ne-sufero.
16. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de mahajano.
17. Perfektiĝo de la ornamo meritoplena de plenumado de ĉiuj deziroj.

(1) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de pureco, la himno diras "En meditado mi observas ke la lando superas tri mondaĉojn en eminenteco."

(2) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de grandeco, la himno diras "Ĝi estas ĉiam kiel la bluĉielo vasta kaj senlima."

(3) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de naturo, la himno diras "La lando estas deveninta de lia supermonda bonradiko kaj lia granda kompato de la absoluta justeco."

(4) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de trajto, la himno diras "Ĝi brilas perfekte kiel spegulo, la suno aŭ la luno."

(5) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de ĝenerala provizo, la himno diras "Provizitaj estas altvaloraj trezoroj kaj ravegaj ornamaĵoj abundas."

(6) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de brileco, la himno diras "Sankta lumo brile lumas tra la lando."

(7) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de tuŝo, la himno diras "Sankta herbo de favoriga naturo ondas delikate tien kaj reen. Ĉiu, kiu ĝin tuŝas, sentos superegan plezuron multe pli ol Kacilindika."

(8) Perfektiĝon de la meritoplena ornamo de Triobla Objekto elfaras tri malsamaj elementoj: 1. akvo, 2. tero, kaj 3. ĉielo.

a) Pri perfektiĝo de la ornamo meritoplena de akvo, la himno diras, "Fontoj,

riveretoj kaj lagetoj estas superkovritaj per miliono da belaj floroj. Milda venteto venadas por karesi la florojn kaj foliojn kaj ilin ekŝancelas kaŭzante diverskolorajn ekbrilojn.”

b) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de tero, la himno diras, “Palacoj kaj turoj malsupren rigardas la pejzaĝon sen kontraŭbaro en ĉiuj direktoj. Jen estas diversspecoj de arboj, ĉiu el apartaj nuanco kaj belegeco, kaj ilin ĉirkaŭas la terasoj el ĝemoj.”

c) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de ĉielo, la himno diras, “En la ĉielo, jen estas penditaj sennombraj juveloj kaj aroj da tintilretoj. Ĉiu tintilreto sonoras kaj deklare eligas la plej superan darman voĉon.”

(9) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de pluvfalo, la himno diras “Ĝi surŝutas la ornamaĵojn de floroj, vestoj kaj abunde de bonodoroj kiuj bonodoras universale.”

(10) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de lumo, la himno diras “La Budha saĝo, brila kaj serena, estas lumanta kiel la suno forigas la mallumon de nescio.”

(11) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de fameco, la himno diras “La glora nomo (de la lando), kies aŭdado kaŭzas profundan kaj subteran spirit-vervekiĝon, disvastiĝas foren en la dek direktoj.”

(12) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de majstro, la himno diras “La lando estas ĉefe traprezidata de perfekte elliberiĝinta Amitajus, la Reĝo de leĝo (Darmo).”

(13) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de loĝanto, la himno diras “La belaj estaĵoj de la Tathagato mirakle naskiĝas el la floroj de lia plej supera saĝo.” Ili ĝuas la guston de la Budho-darmo, kaj igas ĵanon kaj samadhion sia nutraĵo.”

(14) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de ĝuo, la himno diras “Ili ĝuas la guston de la Budho-darmo, kaj igas ĵanon kaj samadhion sia nutraĵo.”

(15) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de ne-sufero, la himno diras “Tie ne ekzistas por la estaĵoj ia doloro ĉu korpa aŭ spirita, sed plezuro por ĉiam kaj konstante.”

(16) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de mahajano, la himno diras “En tiu ĉi bonkvalita modo de Mahajano, ebena kaj ekvipolenta ne aŭdiĝas eĉ la nomoj de naŭzo kaj klaĉo. Virinoj, kripluloj kaj Dvitiya-yana ne naskiĝas en tiu ĉi regno.” Oni sciu ke la rekompencoj aŭ meritoj en la Purlando estas liberaj de du specoj de la malperfektoj de naŭzo kaj klaĉo: 1. substanca kaj 2. nominala.

La substanca malperfekto konsistas el tri: 1. Dvitiya-yana, 2. virino, kaj 3. kripluloj. Ĉar tie ne ekzistas tiuj ĉi tri malperfektoj en la lando, ĝi estas nomata libero de substancaj naŭzoj. La nominala malperfekto estas ankaŭ elfarita el tri. Ne nur troviĝas neniu substanco de la tri, sed eĉ tiuj nomoj - Dvitiya, virino kaj korpa kriplulo - estas nekonataj en la lando. Tiel la lando estas nomata libera de nominalaj naŭzoj. “Ebena kaj ekvipolenta” signifas egalecon kaj unuformecon en la lando.

(17) Pri perfektigo de la ornamo meritoplana de plenumado de ĉiuj deziroj, la himno diras “Kion la vivantaj estaĵoj deziras ĝui, ĉio estos kontentige plenitiga.”

Mi mallonge eksplikis pri la dek sep specoj de perfektigo de la ornamo de

Amitajus-Budha lando kiu videble prezentas perfektigon de la Tathagataj grandaj meritoj (aŭ virtoj) en Lia memprofito kaj de Liaj altruismaj laboroj.

Konsekvence ĉi tiuj ornamaĵoj, (dum elfarantaj) la mirindan vidaĵon de la lando, turnas sin mem en la unuan ĉefan veron de budhismo. Rememoru ke unu kaj dek ses frazoj estas laŭorde klarigitaj.

## 5. Meditado pri la Budho

Kiel meditadi pri perfektigo de la meritoplana ornamo de la Budho? En la meditado pri perfektigo de la meritoplana ornamo de la Budho oni prezentas al si ok malsaman formojn. Kiaj estas la ok formoj?

1. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia sidejo
2. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia korpa strukturo
3. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia parola kapablo
4. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia mensa funkcio
5. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia grandnombra sekvantaro
6. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia kondukisteco
7. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia majstreco
8. Perfektigo de la meritoplana ornamo de lia malfalsa (aŭ neerarema) bonfarado

(1) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo de lia sidejo? La himno diras, "Tiu ĉi granda reĝo de nekalkuleblaj trezoroj sidiĝas sur superbelega lotus-trono."

(2) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo de lia korpa strukturo? La himno diras, "Lia aŭreolo estas unu klafton vasta; Liaj vizaĝkoloro kaj staturo estas multe pli superaj ol tiuj de ĉiuj aliaj estaĵoj."

(3) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo de lia parola kapablo? La himno diras, "Lia superbelsona voĉo aŭdiĝas en ĉiu direkto de la regno."

(4) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo de lia mensa funkcio? La himno diras, "Samkiel tero, akvo, fajro, vento aŭ ĉielo, Li havas enian distingan koron."

(5) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo lia grandnombra sekvantaro? La himno diras, "El lia pura saĝo naskiĝas la ĉieluloj kun konfirmkredo."

(6) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo de lia kondukisteco? La himno diras, "Samkiel la reĝeca Monto Sumeru, Lia superegeco staras sen rivalo."

(7) Kio estas perfektigo de la meritoplana ornamo lia majstreco? La himno diras, "Ĉieluloj adoras kaj ĉirkaŭas lin kun riverenco."

(8) Kio estas la perfektigo de la meritoplana ornamo de Lia Neerarema Bonfarado? La himno diras, "Estas neniu kiu vane observas la efikecon de la Fundamenta Celado de la Budho, kaj forpasas ricevi ĝian influon. Ĉiu observanto estas tuj kontentigitaj per la nemezureblaj trezoroj meritoplana aŭ virtaj."

Tiamaniere kontemplante la Budhon, Bodhisatvo ankoraŭ ne akiranta la purpenson povos definitive proprigi al si la Darmakajon absolute egalan. Same kiel la purpensaj aŭ plialtrangaj Bodhisatvoj, li fine akiros la trankvilan Nirvanon absolute egalan. Mi mallonge eksplikis la ok frazojn kiuj prezentas la perfektigon de la Tathagataj meritoplana ornamo en Liaj mem-profitaj kaj altrudismaj virtoj.

## 6. Meditado pri Bodhisatvo

Kiel meditadi pri la perfektigo de la meritoplenaj ornamoj de Bodhisatvoj? En la meditado pri la Bodhisatvoj mi trovas kvar specojn de la perfektigo de la meritoplenaj ornamoj de iliaj pravaj agoj (por plenumi sian celadon). Kiuj estas la kvar? Unue, Bodhisatvoj, restantaj en la Budho-lando, sen la moveto de siaj korpoj, montras siajn enkorpiĝojn de diversaj formoj ĉie en (aliajn Budholandojn de) ĉiuj direktoj, kaj senĉese plenumas sian mision Budhistan per la laŭvere praktiko de siaj devoj. La himno diras, “En la lando de Feliĉo, pura kaj serena, ĉiam moviĝas la senmakula leĝ-rado. La manifestitaj Budhoj aŭ Bodhisatvoj estas similaj al la suno aŭ Monto Sumeru kiu superregas la mondon!” Ili tiamaniere igas la vivestaĵojn esti similaj al la lotusfloroj malfermantaj en la marĉo.

Due, iliaj enkorpiĝitaj korpoj radias ĉiumomente grandan lumon, kiu atingas ĉiun landon de ĉiuj direktoj samtempe - sed antaŭo kaj malantaŭo de tempo - por doni al ĉiuj estaĵoj spiritoprofiton. Kion ili faras laŭ diversaj manieroj de proceda ekzerco, tio estas nur por forigi la suferojn de ĉiuj estaĵoj. La himno diras, “Ilia solena lumo birlas ĉiumomente kaj samtempe je la kunvenoj de diversaj Budhoj kaj tiele donas favoron al ĉiuj sentovaj estaĵoj.”

Trie, ĵetante lumon senescepte je la granda nombro da kunvenantaro de ĉiuj Budholandoj, Bodhisatvoj, multege estimas kaj senmezure oferfaras al tiuj Budhoj aŭ tathagatou, kaj pleje laŭdas iliajn plenajn meritojn aŭ virtojn. La himno diras, “Ili surŝutas ĉielmuzikon, floron, veston kaj mirindajn parfumojn por fari oferojn kaj kune laŭdas pri la Budhaj bonoj. Ili eĉ ne havas peceton da partieca koro.”

Laste, Bodhisatvoj sin aperigas en ĉiun landon kie ne troviĝas la Tri Trezoroj, kaj provizas la landon per granda maro da meritoj aŭ virtoj de la Trezoroj - Budho, Darmo kaj Sangao. Tiamaniere ili universale diskonigas la laŭveran plenumadon de liaj agdevoj. La himno diras, “En kia ajn lando kie ne ekzistas la bonega trezoro el la Leĝo de la Budho, mi esperas, ĉiuj estaĵoj naskiĝu kaj elmontru la Budhan Leĝon kiel la Budho mem.”

## 7. Perfektiĝo de la Meritoplenaj Ornamoj kaj la Origina Ĵurpromeso

Mi ĝis nun eksplikis pri la meditado pri la perfektigo de la meritoplenaj ornamoj de la Budha lando, pri la perfektigo de la meritoplenaj ornamoj de la Budho kaj pri la perfektigo de la meritoplenaj ornamoj de Bodhisatvoj. Oni rimarku ke tiuj ĉi tri aroj da perfektigoj estas la rekompenco de la Sankta Volo-Ĵurpromeso (aŭ la Fundamenta Celado) (de Amitajus Budho), ĉar ili estas evidente enhavanta en la frazo “Eka-darmo” - la frazo “Eka-darmo” estas la samo kiel la frazo de Pureco, kiu prezentas nenion alian ol la Vera Saĝo, nome la ĉiamekzistanta Darmakajo.

Konsekvence oni devas scii ke estas du frazoj rilate al la Pureco. Kiaj estas tiuj du frazoj? La unua estas Pureco de la materia mondo, kaj la dua la Pureco de la mondo de vivestaĵoj. La unua estas kiel jam eksplikite, elfarita el la deksep perfektigoj de la meritoplenaj ornamoj de la Budho-lando; dum la alia el la ok

perfektiĝoj de la meritoplenaj ornamoj de la Budho kaj el la kvar perfektiĝoj de la meritoplenaj ornamoj de la Bodhisatvoj. Tiamaniere estas la du specoj de Pureco envolvitaj en la frazo, "Eka-darmo".

## 8. Turnado de Merito

Tiamaniere Bodhisatvo devas laŭvere koni ĉi ĉion ambaŭ en ĝenerala kaj en specifaj formoj pere de la Mola aŭ Indulga Koro atingita per la praktiko de Ŝamatha kaj Vipaŝana. Li tiom sukcesos la Manipulan Metodon de Meritorurnado.

Kio estas la Manipula Metodo de meritoturnado ĉe Bodhisatvo? Tio estas ke ĉiuj meritoj kaj bonaj kaŭzoj provizataj per praktiko de la kvinobla Spirita Vojo, konsistanta el Adorado, k.t.p., estas ne por serĉi lian propran plezuron, sed por savi aliajn estaĵojn el suferado, - nome, li deziras naskiĝi en la Budha Lando de Feliĉo ne sole sed kune kun ĉiuj aliaj (sentpovaj) estaĵoj. Tio estas nomata la Manipula Metodo de Meritoturnado ĉe Bodhisatvo.

Elkomprenante la Meritoturnadon sukcese, Bodhisatvo povas tuj baldaŭ liberiĝi el tri malhelpoj kontraŭ la Bodhi-Vojo. Kiaj estas la tri malhelpoj? Unue, pere de la Vojo de Saĝo li ne serĉos sian plezuron, sed sin reteni de egoismo kiu firmtenas sian propran memon. Due, pere de la Vojo de Kompatemo li savas ĉiujn aliajn estaĵojn el suferado, kaj forprenas la penson kiu donas al aliaj maltrankvilon. Trie, pere de la Vojo de Akomodo, li metas kompaton sur ĉiujn estaĵojn suferantajn kaj elpelos la penson kiu inklinas sin adori kaj respektigi. Tio estas nomata liberiĝo el tri malhelpoj kontraŭ la Bodhi-Vojo.

Dum Bodhisatvo evitas ĉi tiujn tri malhelpojn, li sukcesos en la plenumado de tri leĝoj por la Bodi-Vojo. Kio estas la Tri Legoj?

1. Pura koro de Senfirmteniĝo, ke li ne serĉas plezurojn por si mem.
2. Pura koro de Paco, ke li forprenas la suferandon de ĉiuj vivestaĵoj.
3. Pura koro de Feliĉo, ke li igas ilin atingi la Grandan Bodhion, t.e. li igas ilin naskiĝi en la lando de Feliĉo.

Tio ĉi estas nomata la plenumado de la tri leĝoj por la Bodhi-Vojo.

La tri vojoj de Saĝo, Kompatato kaj Alkomodo, supre menciitaj involviĝas en la Praĵna (aŭ la Absoluta Saĝo aŭ la Fundamenta Saĝo de Tiaeco) kiun enkorpiganta estas la Alkomodita (aŭ la Relativa) Saĝo. La supre dirita sindetenado de la egoisma penso kiu firmtenas sian propran memon, forprenado de la penso kiu donas aliajn maltrankvilojn, kaj elpelado de la penso kiu adoras kaj respektegas sin mem, - eksciu ke el ĉi tiuj tri rezultas tute liberiĝi el ĉiu penso kontraŭ la Bodhi-Vojo. La Pura koro de Senfirmteniĝo, [la Pura koro de Paco, kaj]<sup>14</sup> la Pura koro de Feliĉo, - ĉi tiuj tri estas por akiri la Veran kaj laŭdindan koron de la Plejsupera Feliĉo. Tiamaniere Bodhisatva Absoluta Saĝo, Relativa Saĝo, penso de Sen-malhelpo kaj Pensado de Plejsupera Feliĉo ebligas sin naskiĝi en la Pur-lando de la Budho.

Ĉio ĉi tio estas nomata Bodhisatva aŭ Mahasatva-piobeado al Kvinobla Dharma Spirita Vojo. Kion li agas estas perfekte libera kaj laŭvoja; ĉar, kiel ĝisnune ripetite,

---

<sup>14</sup> Ĉi tie mankas traduko de kelkaj vortoj, kiujn la redaktoro intermetis en krampo. [Yamaguti S.]



liaj korpago, buŝago, mensago kaj agoj de la absoluta kaj relativa saĝo estas ĉiuj en harmonio kun la spiritaj vojoj.

## 9. Rezulto de Kvinobla Spiritita Vojo

Plue estas kvin pordoj kiuj aranĝite (ĉi malsupre) provizas kvin specojn de meritoj aŭ virtoj. Kio estas la kvin pordoj? La unua estas la pordo de 'Aliro'; la dua la pordo de 'Granda Kunvenantaro'; la tria la pordo de 'Loĝadejo'; la kvara la pordo de 'Ĉambro'<sup>15</sup>; la kvina la pordo de 'Libera Ludado en Ĝarden-arbaro'. El ĉi tiuj kvin la unuaj kvar estas por provizi la Meriton de Eniro kaj la lasta la Meriton de Eliro.

La Unua Pordo de Eniro. Ĉar Bodhisatvo adoras Amida-Budhon kun deziro naskiĝi en Lia regno, li (baldaŭ) povos renaskiĝi en Lia Lando de Feliĉo (Sukhavatio). Tio ĉi estas nomata la Unua Pordo de Eniro aŭ la Pordo de 'Aliro'.

La Dua Pordo de Eniro. Ĉar Bodhisatvo laŭdas Amida-Budhon recitante Lian Nomon kun plenkredo je ĝia signifo, kaj ekzercas ĉi praktikon sincere per la signo de lumo de Lia Saĝo, li povos aliĝi la nombron de la Granda Kunvenantaro de la Budho. Tio ĉi estas nomata la Dua pordo de Eniro aŭ la Pordo de 'Granda Kunvenantaro'.

La Tria Pordo de Eniro. Ĉar Bodhisatvo pie deziras kun granda fervoro naskiĝi en Lia lando kaj praktikas Samathaon aŭ kvietan Samŭadion, li povos eniri la Mondon de Lotuso. Tio ĉi estas nomata la Tria Pordo de Eniro aŭ la Pordo de 'Loĝadejo'.

La Kvara Pordo de Eniro. Ĉar Bodhisatvo koncentrige meditadas pri la mirindaj ornamaĵoj en praktikado de Vipaŝjano, li atingos en la regnon kaj ricevos spiritajn plezurojn. Tio ĉi estas nomata la Kvara Pordo de Eniro aŭ la Pordo de 'Ĉambro'.

La Kvina Pordo de Eliro. Observante la suferantajn estaĵojn kun sia granda kompatato, Bodhisatvo turnas sin iri en la arbaron pasioplenan en la mondo de naskiĝo kaj morto kaj plenumas sian aktivan servadon per siaj miraklaj povoj. Tio ĉi estas nenio alia ol pro la merito-turnado de lia origina voto (sankta ĵurpromeso). Tio ĉi estas nomata la Kvina Pordo de Eliro aŭ la Pordo de 'Libera Ludado en Ĝarden-Arbaro'.

Oni sciiĝu ke Bodhisatvo plenumas sian devon mem-profitan tra la kvar pordoj de Eniro, kaj altruisman devon per meritoturnado tra la kvina pordo de Eliro.

## 10. Konkludo

Tiamaniere praktikante la Kvinoblan Spiritan Vojon kaj ambaŭ mem-profitan kaj altruisman devojn, Bodhisatvo povas atingi la staton de la plej supera vervekiĝeco.

Jen la Amitayus-Sutropadeŝo kun la Himno de Pieco estas ĝuste finklarigita.

---

<sup>15</sup> Ĉi tie la traduka teksto estas iom konfuzita; origine tekstas jene: la kvara la " 'Restadejo' pordo de 'Ĉambro' " [Yamaguti S.]